


# TEA-BULTENO

5A JARO — JULIO - AÚGUSTO 2002 — NUMEROJ 7-8

## Libertempadi!!!



Finfine alvenis la somera periodo, kiu invitas nin ĉiujn al malstreĉiĝo, al ripozado, al freŝiĝado ĉe maraj, lagaj, riveraj bordoj, al vojaĝoj kaj al ... kongresumado. Inter nenombreblaj eblecoj vi povas elekti, ie ajn tra la tuta mondo, dependas de viaj preferoj: ĉu en Eŭropo - Hispanio, Francio, Nederlando, Pollando, Italio..., ĉu en Afriko - en Benina Respubliko, ĉu en Azio - Koreio, Japanio, Ĉino..., ĉu en Nord-Ameriko - Usono, aŭ en Sud-Ameriko - en Brazilo por partopreni en la 87ª Universala Kongreso de Esperanto. Jes, eble ĉi lasta estas la plej alloga, sed tamen ĉiu ajn okazontaĵo povas esti altira, tio dependas de la individuaj interesoj, deziroj kaj emoj, ĉu ne? Laŭ mi ja sufiĉas iom malproksimiĝi de propra laborejo, por jam ektravivi feliĉajn tagojn kaj forgesi la ĉiutagaĵojn. Por tiuj kiuj ja ferias la tutan jaron, ĉar jam pensiiĝintaj, povas esti agrabla distraĵo eĉ la serĉado de plej taŭga somerumejo. En ĉi julia-aŭgusta numero vi trovos nur kelkajn proponojn, inter kiuj elekti, se ankoraŭ vi ne decidis kie pasigi viajn somerajn feriojn.

Do, feliĉan libertempadon, ĝuoplenan esperantumadon ie ajn tra la mondo! Kaj - plej grave! - revenu hejmen plifortigitaj, entuziasmoriĉaj, por denove vigle kaj energie aktivadi, ĉar en septembro ni rekomencos nian poresperantan agadon, kies programo jam tute pretas!

### IEK 2002, Leuven (Belgio)

SIEK

Al la Internacia Esperanto-Konferenco en Leuven, (20ª-26ª de julio) plus du postkonferencaj turismaj tagoj en Belgio, aliĝis ĝis nun pli ol 80 personoj.

Intensa programo estas zorge preparita por tutĝojigi la konferencanojn. Serio da interesaj prelegoj okazos ekde lundo ĝis ĵaŭdo, pri la temo: "Scienco kaj Socio". Inter la prelegontoj, Maria Butan, Christian Declerck, Eugène De Zilah, Wim De Smet, Bruno Masala kaj multaj aliaj. Ne mankos ĝuendaj momentoj por amuziĝi, distriĝi, plikleriĝi: spektado de diapozitivoj, videofilmoj, kurso pri nederlanda lingvo, prezento de loka kulturo kaj historio, aŭskultado de Esperanto-muziko, turismado kaj multo alia ankoraŭ... Ha, preskaŭ mi estis forgesonta: por bierŝatantoj, jen bon(gust)ega okazo gustumi gustumindan lokan bieron en bierfarejo mem *INTERBREW*.



Kromajn informojn kaj aliĝilon vi trovos ĉe: http://www.esperanto.be/esperanto3000/

### SAT-kongreso en 2002

La 75ª Kongreso de Sennacia Asocio Tutmonda okazas inter 01-07.07.2002 en Alicante, Hispanio. En programo, krom la kutimaj, tradiciaj SAT-programeroj, interesaj prelegoj pri aktuala temaro, diversaj distr- kaj amuziĝ-eblecoj kaj ekskursoj en la regiono.

Pliaj informoj kaj aliĝo ĉe:
Marten Busten Benito - Apt. de Correos 414 - ES-03080
Alicante, Hispanio. Rete: marteno@ctv.es

### Denove en Alicante

Tie okazos ankaŭ la 61ª Hispana Kongreso de Esperanto de la 1ª ĝis la 4ª de aŭgusto. Alicante estas gaja somera urbo ĉe Mediteranea maro. Ĝi havas plurajn belegajn plaĝojn (en kelkaj oni povas forgesi la bankostumon). La klimato estas varmeta, agrabla kaj stabila en aŭgusto. Ĉi gastama urbo havas grandan kvanton da noktaj amuzejoj: trinkejoj, kluboj, dancejoj... Okazos ekskursoj al Benidorm, Elx kaj Valencia.

Informoj: augustocasquero@infonegocio.com

### Medicina kongreso

La 3ª Eŭropa Medicina Esperanto-Kongreso okazas inter la 18ª kaj 26ª de aŭgusto en Budapest kaj Hodmezovasarhely, Hungario. La aranĝo havas tri ĉeftemojn:

* Preventadon
* Restarigon
* Yumeiho-terapion.

Kun la kongreso okazas la ĝenerala kunveno de Yumeiho-kuracistoj. Pliaj informoj kaj aliĝo ĉe:
Katalin Farago - Pf. 89, HU-6801 - Hodmezovasarhely
Rete: konyv@mail.hodtav.hu


### Esperanto kaj Astronomio



La 3ª Staĝo ASTRONOMIO: AMATOROJ KONTRIBUAS de Astronomia Esperanto-Klubo, okazos ekde la 7ª ĝis la 14ª de Septembro 2002, ĉe Sankt-Mikaela Observatorio, suda Francio.

Astronomia Esperanto-Klubo, fondita komence de la 2000ª jaro, anoncas pri sia tria staĝo kiu celas eduki la pli vastan Esperanto-publikon pri la plej antikva scienco: Astronomio. La du antaŭaj staĝoj okazis en la jaro 2000 en E-kulturcentro KVINPETALO (Bureso, Francio) kaj en 2001 en la Observatorio de Monto Chiran en suda Francio. Ĉi-jare la staĝon akceptas Sankt-Mikaela Observatorio (Saint-Michel Observatoire). En ĝi funkcias Centro de Astronomio, kiu regule organizas diversnivelajn staĝojn, akceptas grupojn de gejunuloj (kaj ankaŭ pliaĝuloj) el diversaj regionoj de Francio, okazigas konferencojn kaj la faman someran Astronomian Festivalon. En la Centro disponeblas - unika en Eŭropo - speciala teleskopo por observadi la sunon (diametro de la spegulo egalas al 1,20 m!), Neŭtona teleskopo de 60 cm kun ebleco foti per speciala CCD-kamero astrojn, kaj krome multaj pli malgrandaj teleskopoj. Por ĉiuj partoprenantoj dum la staĝo estas malfermita videoteko kaj riĉa biblioteko, funkcias konstanta interreto kaj foto-laboratorio. Ĉio en la Centro estas farita por doni la plej bonajn kon-

diĉojn al lernantoj - eĉ bongusta manĝaĵo 3-foje dum tago atendas la staĝanojn, 2-4 litaj ĉambroj garantias trankvilecon post la nokta observado. Tute apude de la Centro (je distanco de 1,5 km) troviĝas fama profesia Observatorio de Alta Provenco. Dum la staĝo estos organizata ekskurso (eble eĉ ne unu!) al tiu Observatorio kaj renkontiĝo kun ties sciencistoj. Se vi jam ion scias pri astronomio kaj volus ekscii pli multe - aliĝu, ni garantias ke vi ekscios multe pli. Se vi estas absoluta laiko en astronomio - ne timu, venu kaj vi ekvidos ke nur post unu semajno vi povos orientiĝi laŭ la steloj; diveni sur la ĉielo kiu astro estas stelo, kiu planedo;



proprokule ekvidi nian makulplenan sunon; kaj ekscii multe pli. Eĉ se vi estas profesia astronomo kaj ŝajnas al vi, ke vi jam estas spertulo de la fako - venu, ne hezitu. Estas bona ŝanco por vi ĝui la komunan lingvon, renkonti kolegojn, interkonsenti pri novaj kunlaborprojektoj. Post la staĝo eblas turisti en pitoreska ĉirkaŭaĵo. Gvidanto de la staĝo estos Patrick Lagrange, kiu ne nur denaske parolas Esperanton, sed estas unu el la plej spertaj astronomoj en Esperantujo.

La Observatorio troviĝas apud la urbo Forcalquier kaj estas bone atingebla per aŭto, buso kaj trajno.La kotizo por partopreni en la staĝo estas 280 Eŭroj kaj inkluzivas ĉion: partoprenon, loĝadon, manĝadon, teleskopobservadon, interretumadon, ekskurson ka.

Eblecoj pagi: UEA-konto: aekl-i Astronomia Esperanto-Klubo, aŭ al kluba kasisto (J.C.Rapley, 2 rue du Stade, FR-86410 Bouresse, rete: rapley@club-internet.fr). Pagante el sia UEA-konto al aekl-i oni bonvolu sendi kopion de la ĝirilo al la kasisto.

Detaloj pri la staĝo aperos en la dua Informletero, sur TTT-paĝoj de AEK (www.esperanto.org/AEK). Eblas ricevi informojn retpoŝte de astroek@yahoo.com. Kvin unuaj aliĝantoj ricevos astronomian bildkarton tuj post la aliĝo.

# *Integriĝi jes, asimiliĝi ne!*

La prezidanto de UEA, Renato Corsetti, kaj la vicprezidanto, Lee Chong-Yeong, vizitis Litovujon de la 12ª ĝis la 17ª de majo por rendevui litovajn registarajn instancojn, por atentigi ilin pri la signifo de UK 2005 en Vilnius kaj por peti iniciatan rolon de la litova registaro por Esperanto enlande kaj en internaciaj organizaĵoj.

La unua rendevuo estis kun s-ro Antanas VALIONIS, la ministro pri eksterlandaj aferoj. Parolante pri la aliĝo de Litovujo, malgranda lando, al Eŭropa Unio, kaj parolinte pri la lingva problemo de EU, li firme diris, "...en EU, Litovujo pretas integriĝi, sed ne asimiliĝi", kaj ke li favore konsideras Esperanton. La UEA-delegitaro tute konsentis lian determinon, ĉar ĝi precize kongruas kun la etoso de la neŭtrala lingvo.

Ĉe la rendevuo kun s-ino Asta DIRMAITE, la ĝenerala sekretario de la Litova Nacia Komisiono de UNESKO, ŝi promesis pozitive konsideri la proponon de UEA pri la rezolucio de UNESKO favore al Esperanto. Al s-ro Valentinas MILAKNIS, ĝenerala direktoro de Litovia Nacia Radio kaj Televido, la UEA-delegitaro sugestis radioelsendon en Esperanto tra interreto. Dum la rendevuo de prof-ro Benediktas JUODKA, rektoro de la Vilniusa Universitato, li promesis konsideri aldoni Esperanton kiel unu el la elekteblaj kursoj. Li ankaŭ diris, ke estos bona ideo esplorstudi lingvistikan komparon inter litova lingvo kaj Esperanto. S-ro Algirdas MONKEVICIUS, la ministro pri edukado kaj scienco, montris intereson pri eksperimento pri la propedeŭtika valoro de Esperanto, kiel sugestite de UEA-delegitaro. Kun s-ro Arturas PAULAUSKAS, prezidanto de Litovia Parlamento, kaj tri vicprezidantoj, estis diskutita la rolo de Litovujo kiel estonta membro de Eŭropa Parlamento, koncerne la lingvajn problemojn en EU. S-ro Alvytis LUKOSEVICIUS, direktoro de Ŝtata Turisma Departemento, akceptis la sugeston de UEA-delegito, ke estu eldonita en Esperanto turisma broŝuro okaze de la UK en Vilnius. Urbestroj de Vilnius kaj Kaunas ankaŭ promesis simile. Kun s-ro Gediminas DALINKEVICIUS, prezidanto de parlamenta komitato pri homaj rajtoj, estis priparolitaj la lingvaj aspektoj de homaj rajtoj.

Dum la vizito okazis du gazetaraj konferencoj, unu ĉe la parlamento kaj unu ĉe BNS (Balta Novaĵo-Servo).

La tuta programo estis perfekte organizita de s-ro Povilas JEGOROVAS, prezidanto, kaj s-rino Irena ALIJOSHIUTE, sekretario de LITOVA ESPERANTO-ASOCIO, kaj aktive partoprenita de Litova parlamentano Stasys KRUZINAUSKAS, tre bona esperantisto. Renkontiĝoj kun esperantistoj en Vilnius (ĉirkaŭ 50) kaj Kaunas (ĉirkaŭ 40) estis agrablaj. *Raportis Lee Chong-Yeong*

Jen kelkaj interesaj ejoj en interreto: iru viziti ilin!

- Meteorologia Esperantlingva retpaĝo troviĝas ĉe: http://esperanto.wunderground.com. Tie troveblas plej diverstipaj prognozoj el diversaj partoj de la mondo. Ĉu ankaŭ de via urbo?
- Informoj pri Esperanto-bibliotekoj ĝenerale (kun aŭ sen komputile legeblaj katalogoj) troviĝas ĉe: http://www.cs.chalmers.se/~martinw/esperanto/veb/bibl.html.
- Estas elŝutebla granda Esperanto-angla vortaro kun 80.000 vortoj de: http://hem.passagen.se/hmshm3/vortaro/vortaro.html.
- Kiel Esperantigi kantojn? Vidu http://www.tekstoj.nl/esperanto/konsiloj.htm
- La profesiaj, allogaj retpaĝoj de la grafika kaj retdezajna firmao ARTEMOS indas je vizito. Des pli, ke krom en la franca ili estas ankaŭ en Esperanto. Trovu ilin ĉe http://www.artemos.com

**PROJEKTO LINGVO DE PACO**

Korespondi deziras 3 afganaj gekomencantoj. Ili estas milit-suferantoj kaj rifuĝintoj, kiuj nun loĝas en Irano. Bonvolu kuraĝigi ilin, sendante simplan bildkarton eĉ se vi ne dezirus ade korespondi kun ili!

Jen la korespond-petantoj:

1. f-ino Mojhgan Vatanpur,20-jara, Tabage 3, Buluk-e 2, Shahrak-e Seyd ol Shohada, Kh: Babai, Yaft Abad, Tehran, Iran
2. s-ro Esmail Vakili, 15-jara, NO:4, K: 4 Garbi, Kh: Fakuri, Ashrafi Esfahani, Punak, Tehran, Iran
3. s-ino Malihe Vakili, 21-jara, NO:4, K: 4 Garbi, Kh: Fakuri, Ashrafi Esfahani, Punak, Tehran, Iran.

> Ne juĝu pri afero laŭ ĝia ekstero.
>
> *El Proverbaro de LL Zamenhof*

# Mallonge pri...

✓ **Skolta Esperanto-Ligo** serĉas novan redaktor(in)on por la revuo La Skolta Mondo. Same ni serĉas helpantojn por pligrandigi kaj plibonigi la asocion. Ni urĝe bezonas *novan sangon* por revigligi SEL-on. Krome oni serĉas ankaŭ junajn naciajn reprezentantojn kaj helpantojn en ĉiuj landoj. Ne bezonas esti skolt(in)o por tio. Se vi interesiĝas helpi nin, aŭ iĝi redaktoro de La Skolta Mondo, kontaktu la Ĝeneralan Sekretarion: Hector CAMPOS GREZ, per e-poŝte esperanto@terra.cl aŭ letere al poŝtkesto 231, Curico, Ĉilio, CL-334-000-0

✓ **Mallongaj novaĵoj pri la mondo - en Esperanto!** Bonvenon ĉe: http://intergazeto.inf.hu/ Eblas ricevi la novaĵojn senpage ankaŭ per retpoŝto aŭ per poŝtelefonaj mesaĝetoj (SMS). Anonciĝo ĉe: e-inform@index.hu aŭ telefone +36-1-2173912. Tiu nova servo helpas viajn lernantojn uzi la internacian lingvon en la praktiko. La servon prizorgas:

Thierry Salamon, Abonasoft,
http://abonasoft-esperanto.inf.hu
Bakats utca 1/3 III 1 - HU-1093 Budapest.

✓ **Ĉu vi volas instrui anglan lingvon en Ĉinio?** Se vi parolas ankaŭ la anglan lingvon kaj volas vojaĝi al Ĉinio en julio kaj aŭgusto 2002, jen ŝanco por vi vivi kun ordinaraj urbanoj kaj lernantoj, kaj ebriiĝi de bonodora verda teo en pitoreska te-hejmloko Xinyang (Henan-provinco), instruante anglan lingvon. Xinyang Esperanto-Asocio povas liveri invitilon, aranĝi vian vojaĝon tra Ĉinio, kaj pagi por via instruado laŭ interkonsento. Volontuloj ĝuos senpagajn gastigon kaj vojaĝon. Por kontaktoj: s-ro Zhang Xuesong, Changtaiguan Gongdiansuo, CN-464193 Xinyang, Henan, Ĉinio.

Rete: kunlaboro@sina.com - turismo@371.net

✓ **Nova peranto de SAT en Italujo**
Finfine, SAT havas novan peranton en la lando: temas pri Carlo Bourlot el Torino. Li renkontis Esperanton en 1990, aliĝis al ĉio aliĝebla, IEF, ERA, UEA, ILEI, antaŭ ol renkontiĝi kun SAT. Pasintaŭtune li petis informojn al la Oficejo de SAT kaj profitis por ŝerceti pri la stagno de ties membraro. Tio estis fatala eraro, ĉar li tuj ricevis la taskon okupiĝi pri la SAT-anaro en Italujo. Ĉar jam pasis duona jaro, aliĝontoj havas la elekton, ĉu pagi la plenan kotizon por la jaro 2002ª (43,90 eŭroj) kaj tiel ricevi la kompletan jarkolekton de Sennaciulo, ĉu pagi duonan kotizon (22 eŭroj) kaj ricevi la revuon nur ekde la numero post la pago. Se vi pensas, ke la ekzisto de asocio, kiu utiligas Esperanton por progresemaj celoj, kaj per tio ankaŭ disvastigas Esperanton en progresemaj medioj, estas utila, bonvolu kontakti Karlo-n por aliĝi.

Jen lia adreso:
Carlo Bourlot, Via Quarello 40, IT-10135 Torino
tel 011-3970477 (vespere, ĝis la 23ª horo)
Lia poŝta konto por SAT ccp n-ro: 43976158
ret-adreso ĉe s.bourlot@tiscalinet.it

✓ **Ĝenerala direktoro kaj redaktoro ne plu provizoraj!** Trevor Steele restos la ĝenerala direktoro de UEA dum minimume sekvaj 3 jaroj. Tian decidon unuanime akceptis la estraranoj de UEA dum la maja kunsido en Roterdamo. Sekve de tio, el lia titolo elfalas la vorto "Aganta". Ĝi indikis, ke li okupas la postenon provizore, ĉar oni elektis lin en situacio de tempa premo kaj nesufiĉa anoncado pri la posteno. Nun oni plene konvinkiĝis, ke Trevor Steele estas la homo, kiun UEA bezonas en nunaj cirkonstancoj. Daŭrigon de la kontrakto por 2003ª jaro ricevis ankaŭ la nova redaktoro de la revuo Esperanto Stano Marĉek. La agadoj de ambaŭ, dum la unuaj monatoj de tiu ĉi jaro, estis karakterizitaj kiel *etaj mirakloj*: Trevor sukcesis ekvilibrigi, normaligi kaj parte progresigi la situacion en la Centra Oficejo, Stano – akuratigi kaj plivigligi la revuon Esperanto.

✓ **En Luksemburgio** troviĝas firmao kiu vendas kafon kun la marko Bongusto.


Retpaĝo ĉe: http://www.menuff.com

✓ **Esperanto-biblioteko en Hungario por publiko.** Kolekto de pli ol 40 000 Esperanto-libroj de Karoly Fajszi estis malfermita por la tuta publiko en Budapeŝta biblioteko. Ĉiuj povas foliumi Esperanto-librojn en la Nacia Biblioteko de Malnovaj Libroj. La katalogo estas publikigota ankaŭ en interreto.

✓ **Estis inaŭgurita** la 28an de aprilo **nova Zeo** en placo Esperanto en Karagmatatubo, norda marbordo de provinco São Paulo, Brazilo. La artaĵo-skulptaĵon faris Juliano Junqueira, laŭ mendo de Karagmatatuba Esperanto-Grupo.



# Konkursoj



UEA invitas Vin partopreni en la 2ª **Oratora Konkurso**, okazonta dum la 87ª Universala Kongreso de Esperanto en Fortaleza. Unuafoje ĝi okazis en Zagrebo, pasintjare.

**Temoj**

- Kial mi agadas por Esperanto?
- Egaleco de seksoj.
- Ĉu Esperanto en evolulandoj?
- Lingvaj Homaj Rajtoj.

**Partoprenantoj**

Rajtas partopreni ĉiuj gejunuloj ĝis 28-jaraj, kiuj aliĝis al la kongreso. La partopreno en la konkurso estas senpaga, sed ĉiu kandidato devas, minimume unu tagon antaŭ la konkurso, sin skribe anonci al la LKK: *Michelson* michelson@bol.com.br aŭ al la prezidanto de la juĝkomisiono: Adonis Saliba, Rua Corinto, 543 ap. 81-B, CEP 005586-060 - São Paulo (SP) Brasil; rete: esperanto@astrale.com

**Okazigo**

La Konkurso okazos publike, sub prezido de la prezidanto de la Komisiono kaj en la ĉeesto de du pliaj membroj de la juĝkomisiono. La Oratora Konkurso okazos en la Internacia Lingvo. La kandidatoj devas paroli pri unu el la supraj temoj libere, sen anticipe skribita teksto, sed ili povas uzi memorigajn notojn. Ĉiu kandidato rajtas paroli dum proksimume 10 minutoj, sed la Komisiono povas, depende de la nombro de kandidatoj, longigi aŭ mallongigi tiun limtempon.

La Komisiona prezidanto anoncas, antaŭ la komenciĝo de la konkurso, la decidon de la Komisiono rilate la daŭron de ĉiu parolado. La Komisiono juĝos la paroladojn el vidpunktoj enhava, lingva, stila kaj laŭ la ĝenerala sinteno de la kandidato kiel oratoro.

La konkurso okazos la kongresan ĵaŭdon, de la 12ª ĝis la

13ª horo. La nomo de la salono aperos en la kongresa libro.

**Premioj**

Temos pri tre valoraj libroj. La gajnintoj ricevos ankaŭ diplomojn kaj iliaj nomoj estos proklamitaj dum unu el la kongresaj kunsidoj kaj publikigitaj en la oficiala organo de UEA.

**Internacia konkurso PREMIO NAPOLO 2002**

Por stimuli mondskale intereson pri la kulturaj, artaj kaj pejzaĝaj valoroj de la urbo Napolo kaj ties ĉirkaŭaĵoj, NAPOLA ESPERANTO-ASOCIO invitas partopreni en la konkurso PREMIO NAPOLO 2002.

Temo de la konkurso estas

NAPOLO LAŬ REMEMORO KAJ FANTAZIO

La konkurso strukturiĝas laŭ du sekcioj:

⇨ A - pri literaturo: poezio kaj prozo.

⇨ B - pri bildarto: desegno kaj pentraĵo.

En ĉiu sekcio estos aljuĝitaj, fare de ĵurio, unua kaj dua premioj (diplomo kaj Napola artaĵo), tria premio (diplomo) kaj laŭdaj mencioj (diplomoj). Ĉiu konkursaĵo devas esti sendita ĝis la 30ª de septembro 2002.

Detalan regularon petu de NAPOLA ESPERANTO-ASOCIO, Via Pietro Castellino 115, IT-80131 Napoli, Italio, telefono +39 081 5467760

**Tutmonda fabelkonkurso invitas infanojn verki**

Paatalo-Instituto estas verkista edukcentro en Taivalkoski, Norda Finnlando. Ĝi estas nomita laŭ Kalle Paatalo, eminenta verkisto, kiu naskiĝis en tiu urbo. Unu el la agadoj de la Instituto estas fabelkonkurso por finnaj infanoj, kiu okazas ĉiujare jam ekde 1994. En 2000 la Instituto eksperimente aldonis al la konkurso Esperantlingvan branĉon. Pro bonaj spertoj ĝi estis ripetita en 2001, sub aŭspicio de UEA, kiu donacis libropremiojn al la gajnintoj. Ĉio ripetiĝos ankaŭ ĉijare. Jen la regularo:

Rajtas partopreni infanoj el la tuta mondo, kiuj scipovas aŭ ankoraŭ studas Esperanton. En la konkurso estas tri kategorioj: A - infanoj ĝis 9-jaraj; B - 10-11-jaraj; C - 12-14-jaraj. La konkursaĵoj povas esti verkitaj de individuaj infanoj aŭ de grupoj (ekz. lernejaj klasoj). La ĵurio aprezas la fabelecon kaj originalecon de la verkaĵo. En la skribado aŭ tajpado plenkreskulo rajtas helpi laŭ sia konscienco.

La ĉefa celo de la konkurso estas, ke geknaboj interesiĝu pri la uzado de la lernita lingvo, daŭrigu sian bonan hobion kaj ekzercu sian kreivon. La konkursaĵoj devos atingi la organizanton plej laste la 20ªⁿ de septembro 200-

Oni adresu ilin al: Paatalo-Instituto - PL 39 - FI - 93401 Taivalkoski, Finnlando.

Pli da informoj oni povas ricevi de la komisiito de la Instituto pri la konkurso: Aini Vaaraniemi

Vaarajarventie 26 A - FI-93590 Vanhala, Finnlando

rete: aini.vaaraniemi@pp.inet.fi

La hejmpaĝo de la Instituto estas http://www.taivalkoski.fi/paatalo-instituutti kaj ĝia retadreso estas instituutti@taivalkoski.fi. La direktoro de la Instituto estas Osmo Buller.

**ATENTU! ATENTU! ATENTU!**

La sidejo de Triesta Esperanto-Asocio estos fermita **NUR** de la 12ª de julio ĝis la 1ª de aŭgusto. Bonan feriadon kaj ĝis la revido je la 2ª de aŭgusto!

## Filatela Angulo

**Esperanto ĉe CZ-poŝto**

Rekte ĉe la poŝtoficejo Strážnice, distrikto Hodonín, porokaza dulingva (ĉeĥa kaj Esperanta) afrankmaŝinstampilo funkciadas ekde la 2ª de majo ĝis la 29ª de junio 2002.




Je la kliŝeto de la koncerna stampilo (vd. la bildon) estas la jena teksto ĉeĥlingva "55ª Tutmonda Kongreso de katolikaj esperantistoj Kroměříž 20-27.7.2002" kaj nialingve "Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista".

Aŭtoris ĝin jam tradicie, konata Praga duopo: laŭ projekto de inĝ. ark. Karel Kuča, ĝin majstre gravuris s-ro Karel Pavlíček. Oni anoncas ankaŭ uzadon de E-lingva Reko-glumarko ĉe la menciita poŝtoficejo.

Pluajn informojn vi povas ricevi rekte ĉe: IKUE-Katolika Sekcio de Ĉea, Tršická 6, CZ-751 27 Penčice, tel: +420 641 228304, rete: msvacek@iol.cz aŭ Esperanto, poŝtkesto 36, CZ-696 62 Strážnice.

*Inf. Vl. Hasala*

**Stampo en Kroatio**

Okaze de la 5ª kongreso de kroataj esperantistoj kaj de la 14ª Alp-Adria Konferenco en Rijeka-Kostrena aperis memorkoverto kaj stampo kun jena dato: 31ª de majo 2002. Ĝi mendeblas ĉe KEL.




**Solvo de la kvizo aperinta pasintnumere**

**Kion signifas Pasporta Servo?**

Pasporta Servo estas la gastiga reto de esperantistoj.

**Kie kaj kiam la unuan fojon parolis Esperante papo Johano-Paŭlo la dua?**

Papo Johano-Paŭlo la dua alparolis unuafoje esperante en Czestochowa, en la jaro 1991.

**Inform-artikoloj ŝuldeblas al RET-INFO, NUN kaj NOVA SENTO.**

**BULTENO** de la membroj de
**TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO**
**Sidejo**: Via Crispi 43 - 34125 Trieste
Tel/fakso: +39 040 763128
Reto: esperantotrieste@adriacom.it; nored@tiscalinet.it
**Poŝta adreso**: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349